

& Svato de monta ogrino:

< Rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 448 paŝoj dum 5 minutoj. El sveda tradukis Martin Strid (2016). Klarigoj (*): '1 Sunbrilon ogroj ne toleras. '2 Iranto: Ĉevalo.>

(#Melodio:

<1,6:4> (

mi /milfa milre redo doLa /dolre doTi La; LaTi /do dodo re dolre /mi do h h; /mifa mire redo doLa /dore doTi La La;Ti /do do rere dore /mi do oh;

(#Rekantaĵe: mi /milfa milre redo doLa /dolre doTi La; LaTi /do do re dolre /mi so oh; mi /milfa mire redo doLa /dolre doTi La a;LaTi /dore doTi La ah)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ma/te2no2n frue antaŭ /a2ŭrora sun* ; ; pre ol /ekis la birdo2j /kanti ; /montogrino svatis sin al /bela fraŭlo juna, ; kaj /falsa estis ŝia /lango.

(×: **Sin/jo2ro2 Mane-lig, fi/a2nĉu al mi ; ĉar o/fertas mi vo2/lonte. ; Vi /po2vas respondi nu2r /je2s a2ŭ ne, ; ĉu vi /volas a2ŭ ne.**)

'2 Donos mi al vi la irantojn* dek du ; kiuj iras en roza arbareto. ; Estis neniam selo sur ili, ; nek brido en buŝa meto.

'3 Donos mi al vi muelejojn dek du ; kiuj staras de Tiloj al Tarnoj. ; Ŝtonoj estas el plej pura or' ; kaj radoj arĝente en garno.

'4 Donos mi al vi la glavon el or' ; kiu tintas per dek oraj ringoj. ; Vi batalu kiel volas via vol' ; ; bataleje vi venkon atingos.

'5 Donos mi al vi novan ĉemizon jen, ; vi plej bonan trivi meritas. ; Estas ne kudrita per pinglo aŭ faden' ; sed el blanka silko trikita.

'6 Tiajn donacojn akceptus mi ja ; se vi estus virino kristana. ; Sed nun vi estas plej fia monta ogr' ; el diablo kaj nikso profana.

'7 Kuris eksteren tra pordo montogrin' ; ŝi skuiĝas kaj tremas histere. ; Se mi ricevus belan junan lin, ; mi seniĝus je mia sufero.)